

Hermann Löns,

Aŭdu

tradukita de Manfred Retzlaff

Senviva estas en la mond'
Nenio, ankaŭ la
Dezerta seka sablo kaj
La roko vivas ja.

Malfermu la okulojn, sed
Senvorta tenu vin.
Sekretaj aĵoj tiam al
Vi eksciigos sin.

Komprenos vi la voĉojn de l'
Estaĵoj ĉirkaŭ vi.
Kaj ĉiu sonos, kvazaŭ vin
Salutos kore ĝi.

*Traduko de la Germana poemo "Höret" de HERMANN LÖNS (*1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-621-1255 (2012-10-29 22:20:12)